

Robin Iversen Rønnlund<sup>1</sup>

## "Hunoj", historio kaj hungara turanismo

*La princo ĉe la hunoj*, de Eugène de Zilah, eld. Mondial, Novjorko, 2011,  
619 p, ISBN 9781595691880.

*La princo ĉe la hunoj* estas tre dika romano, kies scenejo estas la centraziaj stepoj en la tria jarcento antaŭ Kristo, kio apartenigas ĝin al la ĝenro "historia fikcio". La ĉefrolulo de la romano estas la ĉina princo Ĉan, kiu, forfuĝinte de malamikoj en la hejmlando, trovas novan hejmon ĉe rajdista popolo de la dezerto. Ni sekvas tra la libro lian adaptiĝon al la fremda kulturo, liajn edziĝojn, liajn oftajn plialtrangiĝojn, migradojn kaj fojajn batalojn. Tre granda rolularo prezentiĝas al ni: krom stepanojn, ni renkontas ankaŭ, interalie, ĉinajn monaĥojn, komercistajn arabojn kaj sciencistajn helenojn. La aŭtoro verŝas amasan informon pri la stepa vivo sur la paĝojn, kaj klarigas detale la ceremoniojn, tradiciojn kaj morojn de la rajdista popolo.



Jes, sole tio ĉi povus esti sufiĉa por plenigi interesan, ekscitan libron. Sed kelkaj gravaj kaj grandaj misaĵoj bedaŭrinde baras la vojon.

Jam la titolo, *La princo ĉe la hunoj*, atentigas min. Zilah nomas la rajdistan popolon "hunoj". Mi min demandas, ĉu li celas tiun rajdistan popolon kiu, regata de Atilo, invadis Eŭropon dum la kvina jarcento p.K.? Ĉu tiujn hunojn? La teksto sur la malantaŭo klare prezentas la rakonton kiel okazantan dum la "(d)ua duono de la 3-a jarcento a.K." Do, la verkisto verŝajne ne celas la samajn hunojn. Mi prenas mian *NPIV*on por kontroli, ĉu ekzistis alia grupo sub tiu nomo, sed ties kunlaboranto ŝajne havis la saman percepton kiel mi.<sup>2</sup> Plua kontrolado en diversaj historiaj verkoj donas al mi la saman informon; la hunoj

1 La aŭtoro de la recenzo estas doktoriĝanto pri klasika arkeologio ĉe la universitato de Gotenburgo.

2 **hun/o** 1. Ano de Azia popolo, kiu invadis Eŭropon en la 4a k 5a jc.  
2. (f) Sovaĝe detruanta barbaro. → vandalo (*NPIV*)

estis popolo de la centraziaj stepoj, kiu subite aperis en Eŭropo dum la kvina jarcento por same subite malaperi.<sup>3</sup> Oni apenaŭ konas ilian devenon, kaj same malmulte iliajn kulturon kaj lingvon.

Tiuj ĉi faktoj tamen ne baras al Zilah, en kies romano ni trovas ion fundamente alian. La aŭtoro pentras tre koloran kaj detalegan bildon de migranta kulturo, klarigas ties morojn kaj religion, kaj uzas multajn vortojn el eĉ pluraj “hunaj” dialektoj.

La “*huniĝo*” estas klare la centra temo de la romano, kaj la verkisto dediĉas la plejmulton de la libraj paĝoj al tiu procezo. Li ne hezitas enmeti senĉesajn priskribojn pri la “hunaj” moroj, pri la “hunaj” ceremonioj, pri kio okazas en la “huna” tendaro ktp. Ni lernas ke la “virhunoj” kaj la “huninoj” havas apartajn diaĵojn, ke furzado ŝajne ne nepre malbonas inter la “hunoj”, ke poligamio normalas en “huna” familio kaj ke seksperforto estas parto de la “huna” geedziĝo, nur por nombri kelkajn interesajn “faktojn”.

Jes, sed tamen, dum la tuta rakonto, mi denove kaj denove demandas min, *kiuj estas tiuj ĉi “hunoj”*, kaj *kiel povas la aŭtoro scii tiom ĉi?*

Fine, mi decidis gugli<sup>4</sup> kelkajn “hunajn” nomojn kaj vortojn kiujn prezentas la aŭtoro. La rezulto iom sennebuligas la aferon: tiuj nomoj kaj vortoj, kiujn mi priserĉis, estas hungaraj aŭ prahungaraj. Sur la kovrilo mi ankaŭ rimarkas kelkajn vortojn en la malnovhungara alfabeto – interalie la nomon de l’ aŭtoro – kiuj eble bildigu la “hunajn” runojn menciatajn en la teksto.

Por scii pli, mi guglas ankaŭ la ligan inter *Hungario* kaj *hunoj*.<sup>5</sup> Ankaŭ ĉi-foje, la serĉo estas fruktodona. La unua rezulto estas artikolo pri “Hungara turanismo”, pseŭdo-sciencia idearo pri la deveno de la hungaroj. Moderna lingvistiko montris antaŭlonge, ke la hungara lingvo anas la finn-ugran lingvofamilion; eltrovo kiu antaŭ jarcento tre ĉagrenis hungarajn naciistojn, kiuj estis imagintaj pli “prestigan” devenon (ekzemple de la skitoj aŭ sumeranoj) kaj ne parencecon kun la “fiŝkaptantaj” (aŭ “fiŝfetoj”) finnoj. Kiel reagon, ili elpensis *turanismon* (hu: *turanizmus*); la misan ideon ke la prahungaroj venis de

3 Rimarkindas tamen ke nomadaj “popolnomoj” tute ne estis io stabila; ofte ili signifis la tuton, aŭ la ĉefan grupon, de tute provizora alianco. Foje grupoj eĉ konscie alprenis nomon de alia jam batalfamigiĝinta grupo por pli impresi la kontraŭulojn. “Subite aperis” en ĉi tiu konteksto kutime signifas: subite aperis en la eŭropaj kronikoj, kiuj tute evidente ne aŭdis pri ili pli frue. Simile pri “subite malaperis”.

4 **gugli**: serĉi per la bitserĉilo Guglo (Google).

5 La simileco inter “hungaro” kaj “huno” estas tute hazarda: la unua venas de latinigo de la praturka *on oğur*, “la dek triboj”. En multaj lingvoj, la nomo aperas sen H-: svede *Ungern*, greke *Ἰουγγαρία*, bulgare *Унгария*.

centra Azio ("Turanio"), kaj – samkiel la turka, japana, korea, sumera kaj skita popoloj (kaj Jesuo Kristo) – apartenas al la "turania raso", raso de militistoj kaj rajdistoj.

Tiajn ĉi ideojn firme kontraŭas la ĉefflua scienco – inkluzive de la Hungara Akademio de la Scienco – pro la giganta manko de pruvoj. Tio tamen ne igas la hungarajn naciistojn forgesi la imagitan gloron; turanismo estis la oficiala historia modelo de la faŝisma Sagokruca partio (1939-1945) kaj daŭre estas ĉe la same faŝisma nuntempa partio Jobbik.

Kial do gravas tio ĉi?

Mi apenaŭ (pro historiaj kialoj) kontestus la romanon de Zilah, se li prezentus ĝin kiel liberan interpreton aŭ fantaziaĵon. Multaj de mi ŝatataj aŭtoroj esploris la eblojn libere formi la historion, por ke ĝi pli bone kongruu kun iliaj propraj ideoj aŭ idealoj – el tio kreiĝis la genro "historia fantasto" – sed indas prezenti sian rakonton kiel, ĝuste, fantaziaĵon. Mi tre aprezus enkondukon al la romano, en kiu la aŭtoro prezentas sian tekston; tie li povus klarigi kiuj estas tiuj "hunoj" ktp, kaj mi ne *same* ĉagreniĝus.

Ekster tiuj pli vastaj miskonceptoj, Zilah ja scipovas prezenti la epokon laŭ ties teknologia nivelo. Nur malmultaj eraretoj ĝenas min, kiel la uzo de papero en la tria jarcento a.K., la ekzisto de papriko ekster Ameriko en la sama epoko, ktp. Li bone spegulas la dependon je ĉevaloj kaj aliaj brutoj, kaj oni ja povas flari la odorojn de la tendaro el inter la paĝoj.

Tio kondukas al la lingvaĵo de la romano. Por mallonge priskribi ĝin: la kvalito de la lingvaĵo estas malebena. Mi rimarkas ke Zilah ja scipovas bone esprimi sin, kio plej evidentas en la malmultaj batalscenoj, kie li permesas al sia lingvaĵo flui rapide tamen precize. Sed tiel bedaŭrinde ne estas en la plejparto de la romano, kie pompa kaj malgracia dialogo regas preskaŭ ĉiujn scenojn. La konstantan ciumadon (!) li klarigas kiel normon en la "huna" lingvo (denove, *de kie venas tiu informo?*), sed ĝi fremdas por miaj okuloj kaj tute malnecesas. La oftegaj honortitoloj eĥiĝas en mia kapo longe post la legado; *bopatra moŝto, centrestra moŝto, milestra moŝto, ŝanjua moŝto...*

Sed kio pli bone prezentus la lingvaĵon ol la lingvaĵo mem?

"La ĉevalo ekgalopis kaj atinginte la lokon de kie ĝi povis vidi la enirejon de la kancelaria ĉarego, ĝi senkomande reprenis la malrapidan paŝan iron de la bovoj en la malvarme brila polvonebulo. Antaŭ la ĉarego ruliĝis du ĉaroj portantaj la impedimentojn de la kancelario, pli antaŭe rajdis kvin tikaj dekopoj;

ĉekape : Mangu flankate de Udan kaj Kund ; maldekstre de la ĉefoj, iliaj ĉefedzinoj : damoj Jesuka, Zita kaj Lajti ; malantaŭ ili senorde karakolis la aliaj edzinoj de la gvida triopo, parolante kaj revante pri la grandfaro de Erenjke. Tri centopoj batalpretaj flankis la kolonon je sagpafo.” – p. 294

Tiu ĉi eltondaĵo estas tipa; Zilah elspezas multajn paĝojn je tiaspecaj ekzaktaj kaj longaj priskriboj de la pozicioj de certaj roluloj en certa sceno, sed apenaŭ trovas spacon priskribi iliajn aspektojn. Mi ne scias kiel aspektas princo Ĉan, aŭ liaj edzinoj aŭ kunuloj, escepte iliajn seksorganojn kaj kelkajn frakasitajn nazojn. Leginte la tutan libron, mi fakte pli bone konas la rajdbestojn laŭ aspekto ol la ĉefrolulojn, kaj oni ne povas diri ke tio estis pro manko de teksta spaco: la libro havas pli ol sescent paĝojn.

La roluloj ne nur laŭ eksteraĵo platas, ankaŭ personece. Neniu persono iam eliras el sia kliŝo: princo Ĉan estas saĝa, la heleno estas sciencopova, la komercistoj estas kapitalemaj, la “hunaj” militistoj estas ferocaj, la virinoj estas submetiĝemaj ktp.

Mi aparte ŝatus protesti kontraŭ ĝuste tiuj priskriboj de virinoj (kaj ankaŭ de viroj). Oni foje diras ke tiu aŭ ĉi tiu historia romano ne estas mem seksisma, sed priskribas seksisman mondon. Kaj vere, oni ne povas postuli de heroo/heroino ke li/ŝi nepre estu feministo se feminismo ankoraŭ ne estis elpensita en la periodo de la rakonto. Sed tio ne signifas ke aŭtoro verku nefeminisme nur pro la nefeminismo de la roluloj. Male, taŭga signo de bona verko estas ke ties aŭtoro sukcesas prezenti maljustaĵojn sen akcepti ilin.

Ekzemple, supozu ke aperus romano pri la brulmortigado de sorĉistinoj en Svedio dum la 17a jarcento, en kiu la povraj virinoj ja kulpas pri la imagitaj krimoj. Aŭ imagu filmon en kiu ĉiuj gulaganoj de stalinisma Sovetunio ja estis krimuloj kaj perfiduloj, en kiu Stalino simple estas bonvola lipharulo. Ĉu tio estus en ordo?

Mi povus preni eĉ pli ekstremajn ekzemplojn, sed mi envere nur volas rimarkigi ke la libro de Zilah havas grandajn mankojn. Ĉar bedaŭrinde, *La princo ĉe la hunoj* estas ekstreme seksisma libro, kaj rakonte kaj stile. Mi, kiel feministo, ne povas akcepti ke la plej grava en la vivo de “hunino” estas prizorgi la dezirojn kaj bezonojn de l’ edzo – la sama edzo kiu frapadas ŝin, seksperfortadas ŝin, posedas ŝin, forvendas ŝiajn infanojn kvazaŭ varojn. Mi povas akcepti ke ŝia medio postulas tion de ŝi, kaj ke multaj “huninoj” tiom penadas ŝajnigi sin tiaj ke ili eĉ ekkredas tiun memmensogon, sed mi *ne* povas akcepti ke ŝi *pro sekso* estas tia.

En la kazo de la jena romano, mi ne dubas ke la kulturoj de l' aziaj stepoj estis tre seksismaj, kvankam mi ankoraŭ ne scias kiuj estas tiuj "hunoj". Estas laŭ mi, tamen, la neplenumita tasko de l' aŭtoro prezenti al ni nuntempuloj modernan bildon, kaj ne bildon kiu taŭgas nur por pratempaj stepanoj.

Daŭrigante la temon seksismo, mi starigas la demandon kial tiom indas priskribi la aspekton de la "hunina" piĉo, kiam apenaŭ menciitas la "huna" kaco? La reganta fokuso sur la virinoj en tiuj scenoj pensigas min pri okcidentnorma heteroseksa pornografio, en kiu la objekto (la virino) troviĝas ĉiam en la centro, kaj la subjekto (la viro) ĉiam estas ie en la fono. Tio, kunigite kun la mekanika lingvaĵo, faras ke mi trovas la scenojn pli-malpli fie senerotikaj.

Zilah enkondukas multajn novajn vortojn kaj literumojn (kiujn li klarigas en glosaro), kies indecon mi pridubas sed tamen akceptas. Rilata al tio estas ankaŭ la malkonsekvenca transliterado de la ĉina: iuloke, la aŭtoro skribas kvazaŭ Esperante "Ĉan" kaj "koŭtoŭi<sup>6</sup>", sed aliloke li skribas pinjine "Wei" kaj "Qin Shi Huangdi". Kiel meti n-finaĵon post nomoj, la aŭtoro evidente ne decidis: mi trovis la variantojn "Oziken", "Ozike'n" kaj "Ozike-n" sen evidenta kialo. Mi notas kelkajn anglismojn ("rumoro" anstataŭ "onidiro"), eblajn skandinavismojn ("gruto" anstataŭ "kaĉo") kaj latinidismojn ("perfavore" anstataŭ "mi petas"), sed ili ĝenerale ne ĝenas la leganton.

Por konkludi, mi ŝatus citi anonimulon kiu diris "indas defendi historion kontraŭ la rakonto"; diraĵo kiu bone spegulas miajn sentojn dum la legado. Mi antaŭ longe venis al la konkludo ke pro mia profesio - tiu de arkeologo - mi kaj aprezas kaj priskeptikas historiajn romanojn tiajn kia *La princo ĉe la hunoj*. Mi bedaŭrinde devas konstati ke ĉi-kaze mi kliniĝas al la direkto de la dua sinteno.

---

6 **koŭtoŭi**: (ĉine *kòutóu* aŭ *kētóu*) genuiĝinte frapi la teron per sia kapo por esprimi la plej grandan respekton aŭ humilon (*Ruĝdoma sonĝo*, vol. 1 el 3, de Cao Xueqin, trad. Xie Yuming, eld. Ĉina Esperanto-Eldonejo, Beijing, 1995, p. 48).